

Numero: 274.
Marto: 2015.

23-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Lingva fenomeno

Ĉiutage ni povas sperti la novan popolmigradon. Homamasoj ekiras de sudo al nordo kaj de oriento al okcidento. Tio ĉi estas grava socia problemo. El malriĉaj landoj oni ekiras al la riĉaj landoj de EU esperante, ke en tiuj ĉi landoj oni trovos laboron, pli bonajn vivkondiĉojn.

Post la politikaj ŝanĝiĝoj 1989 ankaŭ el Hungario multaj, precipe gejunuloj iras al iu okcidenta lando.

Tio jam daŭras depost jaroj kaj el ili multaj translokiĝis por ĉiam eksterlanden, eĉ fondis tie familion.

Kio sekvas el tio? Tiuj ĉi homoj ŝanĝas ne nur laborlokon kaj urbon, sed dum jaroj ili uzas sian gepatran lingvon malpli, ol kiam ili loĝis en Hungario.

Antaŭ nelonge mi vidis sur fejsbuko, kiel du hungaroj babilis en fremda lingvo. Kvankam ili ambaŭ havas komunan gepatran lingvon, malgraŭ tio ili astataŭis la hungaran lingvon je la tiea loka lingvo.

Certe nun estas kiuj diras, tiuj ĉi hungaroj nur ekzercis la lingvon. Eble. Sed en tiu ĉi fenomeno mi vidas danĝeron.

Laŭ mi, alvenos tempo, kiam tiuj ĉi homoj jam ne uzos tiun belan lingvon pri kio ilin instruis ilia patrino.

Ankoraŭ neniu scias, kiom forta estas la hungara lingvo. Ĉu ĝi estos kapabla transvivi la „novan popolmigradon“?

Nia lingvo jam ekzistas depost pluraj jarmiloj kaj ĝi transvivis multajn provadon de diversaj grandpotencoj malaperigi ĝin el la lingvoj de la homaro.

Se ni studas la historion de la lingvoj ni povas vivi dum jarmiloj, kiom da lingvoj malaperis pri kiuj ni jam apenaŭ memoras.

Espereble ankaŭ nun la hungara lingvo superos tiun ĉi popolmigradon kaj ĝi plifortiĝante brilos plu riĉigante la homan kulturon.

-Redaktanto-



Kial ekzistas lingvoj?

Amiko, mi sincere diras al vi; mi ne scias. Jes, iam mi fanfaronis, ke mi scias la respondon. Tio ne estas vera.

Sur ter globo ekzistas pluraj mil lingvoj. El ili estas, kiujn oni parolas nur kelkaj dekoj da homoj. Sed tamen ili ekzistas. Kompreneble estas grandegaj mondlingvoj.

Estus pli facile, se nur unusola lingvo estus parolata, kaj per ĝi ĉiu homo povintus kompreni sin en la tuta mondo.

Kiel mi diris, ekzistas multaj lingvoj, kaj oni devas lerni ilin, se oni deziras eviti la miskomprenojn.

Ĉiu scias, la lingvolernado ne estas facila laboro. La lernanto devas lerni monatojn, eĉ ofte jarojn ĝis la elektita lingvo fariĝos sia propra.

Ho, kiel mi diris sia propra? Ja ĉiu scias, la lernita lingvo neniam estos tiel parolata, kiel tiu homo kiu suĉis la lingvoscion kun la patrina lakto.

Multaj homoj revadas pri komuna lingvo, per kiu oni povas komuniki senĝene, libere kaj sendepende.

Tiujn homojn oni nomas utopistoj kaj revemuloj. Nur kelkaj opinias, ke la sonĝo de tiuj ĉi homoj ne estas fantastaĵo, sed realigebla plano, per kiu la diverslingvaj homoj povus faligi la lingvajn murojn.

Se ĉiu homo povus kredi je komuna lingvo, tiam eble ĝi baldaŭe povus realiĝi kaj sur Tero estus pli facila kompreni unu la alian.

Laŭ mi, la homaro ankoraŭ ne maturiĝis por komuna lingvo. Ni ankoraŭ ne vidas la eblojn en tia lingvo. Anstataŭ tio nuntempe ni elektas diversajn mondlingvojn pensante, ke per ili ni povos orientiĝi pli facile eksterlande aŭ sur internacia tereno.

Mi ne scias, ankoraŭ kiom longe ni devas atendi ĝis ni travidos, la homaro nepre bezonos tian helplingvon.

Ankaŭ nun estas adeptoj de tiu ĉi internacia lingvo. Verdire ili estas ofte pririditaj kaj primokitaj. Malgraŭ tio tiuj ĉi homoj semas kaj semas nelaciĝante.

Eble iam alvenos tiu belega tago, kiam ni unuanime akceptos la grandiozan lingvon de doktoro Zamenhof.

-Ŝaŝa-



Galaksia alfabeto

Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
IX-a

Li ne ricevis respondon. La paŝoj mallaŭtiĝis kaj fine tute ĉesis.


Tio ĉi tre malgajigis lin. Li malvarmis, ĉar en la kelo ne estis hejtado. Sen hejtado en tiaj ejoj la temperaturo rapide iĝas malvarma.

Denove sekvis ĝenaj momentoj dum kio nenio okazis. Johano ne povis movi. La rimenoj forte ligis lin al la tablo.

Tio estis la plej terura, ke li ne sciis, kial li estas tie ĉi. Almenaŭ oni dirus al li pro kio li devas suferi.

Li sentis, se baldaŭ ne okazos io, li freneziĝos. La kapo tre doloris lin kaj krome li estis soifa. Lia lango kaj tuta gorĝo estis seka. Li jam apenaŭ havis salivon. Ekde kiam li kuŝas sur tiu ĉi malmola tablo? Li ne sciis.

Li ekprovis liberigi siajn brakojn. Unue ne sukcesis, eĉ la rimeno akre enranĉis lian dekstran pojnon, sed la maldekstra kvazaŭ estintus pli movebla. Tio ĉi donis iom da espero al Johano. Se li povus liberigi ĝin, tiam eble per ĝi li povus helpi, eĉ forlasi tiun ĉi teruran tablon.



La provado estis tre doloriga, tamen fine lasis la rimeno kaj post kelkaj minutoj lia maldekstra brako estis libera.

Johano iom trankviliĝis kaj li vidis esperon. Vere dum la brakoliberigado li tre laciĝis kaj la soifo estis neeltenebla. Se li ne povos trinki ion, tiam li mortos.

Sekvis la liberigado de la alia brako. Se ĝi sukcesos tiam saviĝos. Nun jam li povis helpi per la maldekstra mano. Tio ne estis facila, sed tamen sukcesis forigi la rimenon de sur pojno kaj poste de sur ambaŭ kruroj. Li ĝuste intencis desalti, kiam la paŝoj denove aŭdiĝis. Ili estis mallaŭtaj kaj malrapidaj. Kvazaŭ oni promenadus en la najbara ejo. Iom ili plilaŭtiĝis kaj post kelkaj sekundoj ili eksilentis. La promenanto haltis aŭ foriris. Tion li ne sciis.

Li atendis senmove kuŝante sur la tablo.

Pasis denove longaj torturaj minutoj ĝis Johano kuraĝis ekmovi. Li singardeme desurtablĝis kaj ĉirkaŭrigardis en la kelo. Liaj okuloj jam alkutimiĝis al la malhelo. Li iris malrapide al la lignopordo sur kiu estis densa, ferokrado. Li rigardis tra ĝi, sed nenio interesa tra la fenestro. Ne estis videbla la

promenanto. Eble li estis en la proksimo aŭ li jam foriris.

Johano ne komprenis, kion oni deziras de li. Kial li estas fermita en la kelo?

Li kelkfoje ĉirkaŭiris sian malliberejon. Li ekzamenis ĉion. Lin tre interesis la rusta vitroskatolo. Ĝi estis malpura kaj polva. Li ne povis malfermi ĝin, ĉar li ne trovis ĝian aperturon. Estis granda sekreto por kio servis tiu ĉi stranga skatolo. La vitro ne estis travidebla.



Kiel Johano rigardadis ĝin, subite li rimarkis, ke la skatolo alternadis sian koloron. Unue ĝi estis verda, sed kiel li tuŝis ĝin per sia manplato la koloro ŝanĝiĝis je ruĝa.

Li ne povis longe distri sin per la vitroskatolo, ĉar neatendite denove aŭdiĝis la konataj paŝoj.

Kion fari nun? – li surpriziĝis.

La paŝoj denove silentiĝis kaj la fremdulo ne venis al la pordo.

Johano ŝteliris al la karda pordo kaj li rigardis tra la malgranda fenestro.

Li ne vidis homon nur malklaran ombron, kiu apenaŭ movis sur la vidalvida betonmuro.

Unue Johano deziris demandi, kiu vi estas? Sed fine li ŝanĝis sian decidon. Eble tio ne estus bona ideo. Oni eksciis, ke li liberigis sin.

Li staris ĉe la pordo kaj aŭskultadis, kvazaŭ el la silento li povintus ekscii ion.

La ombro ne malaperis. Ŝajne ĝia mastro staras tie senmove. Kial oni malliberigis lin? Johanon kaptis ĉagreno kaj li ĵetis kaŝrigardon al la vitroskatolo, kiu ĝuste tiam ŝanĝiĝis je nova koloro.

(-daŭrigota-)



Poezio

Esperanto donis multe da poetoj al la mondo. Ekzistas originala kaj tradukita poezio. En interreto oni povas trovi grandiozajn poemojn. Mi proponas al tiuj, kiuj ŝatas legi versojn.

Komprenble grave, ke ni aĉetu ankaŭ poemplibrojn kaj per la aĉeto ni apogas la poeton.

Ankaŭ poeto estas homo kaj sen mono ankaŭ literaturo ne povas ekzisti.

Anĉaro

de A. PUŜKIN

esperantigis K. KALOCSAY

originale aperis en *la nica literatura revuo*, 3/1 p.
2-3

En la dezert' sterile nuda,
El grund' bakita de sunardo
Anĉar' elĝermis, staras muta;
Ne kreskas en proksim' eĉ kardo.

Ĝin naskis la soifa tero
En furiozo mond-malbena,
Kaj per veneno de kolero
Saturis ĉiun fibron plena.

Venen' filtriĝas tra la krusto
En la tagmeza varmo suna,
Ĉe l' vento de vesperkrepusko
Koaglas je rezino bruna.

Proksimon ĝian bird' evitas
Kaj timas tigro. Se la sibla
Venteg' la branĉojn ekagitas,
Tuj plu ĝi flugas, venen-kribra.

Kaj se la nuboj de l' ĉielo
Pluverojn sur anĉaron ŝutas,
De la folioj kaj de l' ŝelo
Venene tiuj teren gutas.

Hom' homon tamen por aliro
Komandis per rigard' rigora,
Fidele iris tiu viro,
Revenis kun la suk' horora.

En sako, krom rezin' fatala,
Velkintan branĉon la sendito
Alportis kun vizaĝo pala,
Kovrata de malvarma ŝvito.

Li falis tie tuj en sveno
Pro elĉerpiĝ' de l' lasta forto,
Ĉe l' trono de la suvereno
La sklavon tiel trafis morto.

Ordonis ĉiujn sagojn suki
La princo per venen' anĉara,
Per arkoj tiel sendis flugi
La morton al popol' najbara.



Caius Valerius Catullus HIMNO AL DIANA

Al Diana adeptas ni,
Ĉasta knaba, knabina rond'.
Do diinon Diana ni
Kantu, ĉastaj geknaboj.

Ho, filin' de Latona kaj
De l' plejgranda Jupitero, via
Naskis via patrino en
Delos, sub olearbo.

Ke vi estu estrino de
Montoj, verdaj arbaroj, de
Valoj kaŝe kuŝantaj, de
Akvoj brue fluantaj.

Helpas vi en akuŝdolor'
Ho *Lucina*; ĉe vojkruciĝ'
Ho, *Trivia*, vi regas; vin
Luman, nomas ni *Luna*.

La mezuron al jara kur'
Donas via monata voj',
Vi la domon de l' kamparan'
Benas riĉe per fruktoj.

Plaĉu kiu ajn nomo vin,
Estu bona al Roma gent',
Laŭ antikva kutimo kaj
Benu ĝin per abundo.

Por infanoj

La malkuraĝa drako



Iam trans la Fabeloceano vivis sepkapa drako en granda groto. La homoj evitis ĝian loĝlokon, ĉar eĉ la infanoj scias, la sepkapa drako estas tre, tre danĝera besto.

Ĝenerale ĝi forrabas reĝidinojn kaj murdas ĉiun, kiu kuraĝas ĝeni ĝin.

Sed tiu ĉi drako ne estis tia. Ĝi estis timema kaj ĝi ĉiam forkuris, se homo venis hazarde al la groto.

Sed tion ĉi neniu sciis. Eĉ en la proksimaj vilaĝoj oni tremis, se ĝia nomo estis elbuŝita.

La homoj decidis, ke ili forpelos la drakon. Ili kunsidis priparoli, kiel liberigi de ĝi. Ili serĉis bravulon, kiu luktos kun la sepkapa drako. En la tuta lando estis anoncita, ke bravulo estas serĉata.

Ili longe atendis, sed ne alvenis kandidato. Ĉiu timis sian vivon.

Pasis multaj tagoj ĝis en iu mateno junulo ekaperis ĉe la vilaĝfino. Li estis gaja vagabondo, kiu iris de vilaĝo al vilaĝo, kaj tie li serĉis laboron. Li ne petis monon. Por li sufiĉis tranoktejo kaj iom da manĝaĵo.

Rekte li iris al la vilaĝestro kaj demandis:

-Sinjoro vilaĝestro, mi serĉas laboron. Ĉu vi povus doni ion ajn al mi?

La la okuloj de la maljuna viro ekbrilis:

-Mia filo, kara, vi venis ĝustatempe. Ni serĉas bravulon, kiu murdos la sepkapan drakon. Ĉu vi akceptas tiun ĉi laboron? Ni donas al vi tiom da oro, kiom vi povos kunporti. Krome mi plenumos vian deziron.

La vilaĝestro havis belegan filinon. Ŝi promenis en la florigardeno. La junulo ekvidis ŝin tra la fenestro. Li tuj enamiĝis al ŝi.

Mi murdos la sepkapan drakon, se mi povos edzinigi tiun ĉi belegan knabinon.

Tio ĉi ne tro plaĉis al la vilaĝestro, kaj li provis deadmoni la junulon pri lia decido.

-Se vi ne donos al mi ŝian manon, tiam mi ne luktos kontraŭ la sepkapa drako – li diris aplombe.

Kion fari? La vilaĝestro cedis kaj li promesis, ke sia filino estos la edzino de la vagabondo.

Alitage frumatene la novbakita bravulo ekiris al la groto de la sepkapa drako. De la vilaĝanoj li ricevis

diversajn armilojn kaj ĉevalon. En la vilaĝo neniu esperis, ke li sukcesos venki la drakon. Estis kelkaj maljunulinoj, kiuj larmis lin kaj ĝemadis, tiel june morti. Ja li devus sidi sur la jupo de sia patrino.

La junulo iris tra arbaroj, tra kamparoj ĝis li atingis la groton.



Sed kiel mi jam diris, la sepkapa drako estis malkuraĝa, kaj kiam li ekvidis la proksimiĝantan vagabondon, ĝi tuj kaŝiĝis en la groton. Ĝi tie ploradis amare kaj ĝi tremis.

La junulo haltis antaŭ la enirejo de la groto kaj li enkriis:

-Ĉu vi estas ene sepkapa drako? Mi volas lukti kontraŭ vi. Mi devas murdi vin por ke la filino de la vilaĝestro estu la mia.

Kiam la sepkapa drako ekaŭdus tion ĉi, ĝi tre, tre ektimis. El ĝiaj dekvar okuloj tiel fluis la larmo, ke dum kelkaj minutoj antaŭ la groto fariĝis lago en kio orofiŝoj naĝadis.

La junulo atendis iomete kaj li denove ripetis. Sed nun jam pli kolereme kaj pli laŭte.

Je tio la sepkapa drako ploris pli intense. El la lago fariĝis granda maro kaj meze de la maro estis admirinda insulo.

La vagabondo ankaŭ triafoje alvokis ĝin. Pasis almenaŭ duonhoro ĝis la sepkapa drako elvenis. Ĝi tuj komencis petegi:

-Kara junulo, indulgu mian vivon! Mi servos vin ĝis la morto. Mi plenumos viajn dezirojn. Vidu tiun ĉi grandan maron kaj sur ĝia mezo tiun admirindan insulon. Mi donacos al vi ĝin, se vi ne mortos min. Vi estos ĝia reĝo.

La vagabondo kompatis ĝin kaj li ne sciis, kion fari?

-Se mi ne murdos vin, tiam neniam estos mia edzino la filino de la vilaĝestro. Al li mi devus montri viajn sep kapojn detranĉitajn.

(-daŭrigota-)



Fortikaĵoj

Fortikaĵoj

